

H.E.J.S.

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:
S-RO. MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

N.º 98
Jan.-Feb. 1976

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 424 44 92 - BILBAO-5



IIª H. E. J. S. TENDARO: SANTANDER



enhavo

Nuna estraro	1
Ek al la novjara vojo !	2
Notoj (II-a HEJS-tendaro)	3
HEJS-75 : Jarraporto	4-5-6
Paŝo post paŝo	6
La santander-ido	7-8-9
Ĉu Altamira en danĝero?.....	9-10-11
Kastilia lingvo en Surinamo	11
Burgos : nova grundo	12
Muzika paĝo	13
Hejdi	14
La okulo de la morto (3).....	15-16

Saluton!

Jen la vorto (sento) kiu helpas min komenci antaŭ la HEJS-anaro mian redaktoran laboron, neniom pli mi deziras diri krom ke miaj deklaroj estas kaj estos nur miaj agoj, ĉiam konforme al nia regularo.

ESTRARO DE HEJS POR LA JARO 1976

- Prezidanto:** S-ro Miguel Angel Altuna
T. Ortiz de Zarate 21-6. Bilbao-3
- Vicprezidanto:** (rilatoj kun TEJO kaj HEJS-redaktoro)
S-ro Miguel Gutierrez Aduriz
Floranes 57 - 2C Santander
- Vicprezidanto:** (rilatoj kun la HEJS-delegitoj)
F-ino Mercedes Castro
Moncada 4 - 9C Bilbao-2
- Sekretario:** F-ino Laura Garcia
Cataluña 5 - 1 iz. Basauri (Bizkaia)
- Kasisto:** S-ro José Miguel Fernández-Zurbitu
Gregorio de la Revilla 21-2 Bilbao-11
- Membroj:** S-ro Francisco Jiménez
Joaquin Garcia Morato 152 bajo. Madrid-3
S-ro Llorenç Martí
Ribot i Serra 114 sabadell (Barna)
S-ro Francesc Ibáñez
Diputacion 199. Barcelona-11
F-ino Conchi Lezama
Camino Trauco 21-3 drch. Bilbao-7



ek al la novjara vojo !

PROJEKTOJ DE NIA SEKCIO POR 1976

Kondiĉita de la nunaj ne favoraj cirkonstancoj (inter ili, eble, la plej grava estas ke nia prezidanto ferias en la paradizaj Kanariaj Insuloj kun pafilo sur la ŝultro), oni aprovis en la lasta estrarkunsido de nia sekcio la jenajn iniciatojn por la ĉijara agado:

- a) II-a HEJS-tendaro: Okazigi ĝin en Santander de la 15-a ĝis la 18-a de aprilo.
- b) Helpo al la disvastigo de E-o en kastilingvaj landoj: Ĝi efektiviĝos per sendado de inform- kaj lern-materialo.
- c) Kunlaboro kun REGIONA AGADO de TEJO: daŭre ni kunlaboros ĉijare kun R-A per sendado de nia bulteno al aktivuloj en senmovadaj landoj.
- d) Subvencioj al junularaj aranĝoj: Tiu estas tute nova iniciato en nia sekcio, kiu celas stimuli la aranĝojn kies celo kaj sinteno iel favoros al HEJS.

Kiel vi povas konstati mankas ĉijare la iniciato "Konkurso", kiu dum la lastaj tri jaroj estis kutimaĵo en nia agado; tamen, por iel ŝtopi la vakuon kaj rekompenci nian legantaron, HEJS-bulteno aranĝos kelkajn konkursojn kun valoraj premioj.

NOTOJ

a) Sinjoro Aragay (fondinto de HEJS) ĵus transprenis la taskon esti la nova redaktoro de "BOLETIN", bul-teno de HEF. Konsekvence, cele al organizado de la redakcia stabo kaj pretigado de la revuo, oni devas sendi ĉiujn proponojn, sugestojn, notojn, informojn kaj artikolojn al la jena adreso:

Salvador Aragay
Bassegoda 40 - 3 - 1 ■
Barcelona -14-

b) La kvalito de la sloganoj prezentitaj al konkurso "Hispanlingvaj sloganoj", decidigis la estraron ne aljuĝi la 1-an premion. Tamen tri specialaj premioj estis aljuĝitaj; ili konsistas el libroj. La gajnintoj estis: Madrida E-liceo kaj Juan José Camus.

II-a HEJS-tendaro

En la kampadejo "Bellavista" de la 15-a ĝis la 18-a de aprilo (sankta semajno) renkontiĝos junuloj el la tuta Hispanio por paroli, ludi, ekskursi, amuziĝi kaj iom pli serioze pritrakti la estontecon de la esperanta junulara movado.

Se vi volas veni, sendu tuj rapide la kotizon kaj la aliĝilon al la konstanta adreso (Floranés 57-2C Santander). 200 ptojn ne estas multe da mono kaj ĝi kovras la kampadajn elspezojn. Se vi ne havas tendon, tio ne gravas, venu iel ajn kun via dormosako, (tamen, se vi havas ejon, kunportu ĝin). Ankaŭ se vi ne volas dormi en tendo, pro kataremo aŭ alia emo, ne hezitu, ĉar la kampadejo disponigas dulitajn ĉambrojn je malalta prezo (50 ptojn po lito).

Por atingi la kampadejon oni devas uzi la buslinion n-ro "1", aŭ pli bone specialan buslinion nomata "Cueto-Santander, kiun oni povas trovi en la stacidoma placo.

Ankaŭ, kiel pasintjare, dum la tendaro okazos estraran kunsidon, kio ebligos al vi scii pri kiel marŝas via sekcio. Do, NI ATENDAS VIN! NE FORGESU VENI!

HEJS -75 : JARRAPORTO

Dum tiu ĉi jaro, la konsisto de la estraro estis la jena:

Prezidanto kaj Redaktoro:

Miguel A. Altuna, el Bilbao

Vicprezidanto por rilatoj kun TEJO:

Miguel Gutiérrez, el Santander

Vicprezidanto por rilatoj kun HEJS-deleg:

Pedro Pérez, el Bilbao

Sekretario: Laura García, el Bilbao

Vicsekretario: Mercedes Castro, el Bilbao

Kasisto: José Miguel Fdez-Zurbitu, el Bilbao

Membroj: Juan Ramón Guiñón, el Barcelona

Leandro Trujillo, el La Laguna

Conchi Lezama, el Bilbao

Susana Santos, el Bilbao

La membronombro estis 243, el kiuj 52 estis samtempe membroj-abonantoj de HEF. La nombro de delegitoj estis 17. Se fakte ne multe kreskis nia membraro kompare al la 233 pasintjaraj membroj, tio ne signifas ke varbado mankis, ĉar ĉefe tri aktivaj delegitoj sukcesis aligi sufiĉe grandan nombron da gejunuloj al niaj vicoj. La eksigoj estas ŝulditaj precipe al adresŝanĝoj ne sciigitaj al ni. Ankaŭ ĉi-jare principe ni samtempe varbis por TEJO, donacante al varbintoj ekzemplon de "Kontakto"; bedaŭrinde, tamen, ni konjektas ke la efiko estis nula tiusence.

Daŭre regule aperis nia bulteno "HEJS", kiu, post ŝanĝo de Redaktoro, pligrandigis sian paĝnombron de 12 al 16 paĝoj, danke al pli granda kunlaboro en la redaktado de artikoloj. Ĝi aperis, kiel kutime, ĉiun duan monaton; meza eldonnombro estis 350. La kvalito de kunlaboraĵoj kaj presado konsiderinde altiĝis, ĉefe en la unuaj ĉi-jaraj numeroj, kio vekis atenton ekster niaj rondo, tiel ke represoj kaj laŭdaj mencioj aperis en pluraj E-bultenoj, interalie en "Esperanto" de UEA kaj en "Boletín" de Hispana Esperanto-Federacio. El la 96 publikigitaj paĝoj, 9 estis

dediĉitaj al TEJO: 2 pri "Kontakto", 5 pri la 31^a IJK, 1 pri la TEJO-Seminario en Coimbra kaj 1 pri Pasporta Servo.

Al la regula eldono oni devas aldoni la aperigon de eksterordinara 12-paĝa bulteno, entenanta esperantan tradukon de hispanlingvaj kanzonoj, kiu frue elterpigiĝis.

En tiu ĉi jaro estis akceptita de HEF-estraro, kun 1 sola amendo, nia projekto de Regularo. Tiamaniere, niaj rilatoj kun la hispana federacio kaj tiuj interne de nia organizaĵo havas ian leĝan normon.

Rilate al la kuniĝo de nia membraro, grava iniciato estis la okazigo de la 1^a HEJS-Tendaro dum Paska Semajno en Zaragoza. Estis sufiĉe sukcesa tiu ĉi kunveno, ĉar ĝi allogis 55 partoprenantojn. Bedaŭrinde, tamen, ekzistis gravaj organizaj mankoj ŝulditaj al nesperteco kaj malproksimeco de la organizantoj. Ni esperas draste plibonigi tion en la venontjara Tendaro, okazonta en Santander.

Ĝadre ankaŭ de interna aktivigo, ni notas la finon de fota konkurso starigita en 1974, kiu havis koncernan premion. Tiusence, kaj cele al ebla estonta informa kampanjo al ekstera publiko, komence de la jaro ni starigis konkurson por hispanlingvaj sloganoj pri Esperanto. Ĝi havis reagojn.

Ankaŭ ĉi-jare ni iomete helpis disvastigon de Esperanto en hispanlingvaj landoj. Ni sendis instrumentarion kaj informilojn al Antiokia E-Ligo, en Medellín (Kolombio).

La kunlaboro kun Regiona Agado de TEJO, per sendado de nia bulteno al aktivuloj en senmovadaj landoj, regule efektiviĝis.

Du novaj servoj estas kreitaj, nome: Libroservo, kiu disponigas al la membroj kelkajn librojn je favoraj prezoj, kaj Gastiga Servo, kiu, ni esperas, povos en la jaro 1976 kunlabori kun Pasporta Servo de TEJO.

Aparte de la aktivado de la Sekcio kiel tia, ni devas atenti ankaŭ la agadon de la lokaj junularaj grupoj, el kiuj plej aktiva estis tiu de Sabadell, kies membroj en nombro de 18 partoprenis nin an Tendaron, plurfoje ludis esperantajn teatraĵojn

interalie dum la lasta hispana kongreso, organizis artan festivalon kaj, por la tria fojo, aŭtunan junularan renkontiĝon, kun la partopreno de (?) ĉeestantoj. Ankaŭ estas menciindaj la E-junularoj de Madrid kaj Barcelona.

Pri la rilatoj de HEJS kun TEJO, nenio nova okazis. Kiel vidite, nia atento al la tutmonda organizaĵo montriĝas en nia bulteno kaj kelkaj iniciatoj.

La rilatoj kun Hispana Esperanto-Federacio, se ne fortaj, almenaŭ ne estas malbonaj. La ĉi-jare interkonsentita Regularo pli klare formaligas ilin, kaj eble oni povos trovi ian formon de pli amika kunlaborado.

Resume, se ne tre sukcesa, nia ĉi-jara agado havis ian efikon.


Nome de HEJS informis

Máguel Angel Altuna
Prezidante

Laura García
Sekretariino

paŝo post paŝo ...

post longa "laboro"



Ekde ĝia apero (je la fino de la pasinta jaro), la dekreto kiu reguligas la uzadon de la hispanaj regionaj lingvoj provokis grandan kvanton de reagoj sub formo de deklaroj, el kiuj la plej multo estis kontraŭaj al la sinteno de l'menciita dekreto, kaj la restantaj estis nur prudentaj mencioj pri espero.

Trakti ĉi temon estas ja delikata afero kiun ni preferas lasi por la pli sperta analizo de faka revuo, kia ETNISMO.

Tamen ni povas aldoni, ke tuj post kompreni ke lamentado kondukas nenien; la kataluna, vaska, kaj galega frontoj komencis aranĝi ĉion necesa por labori kiel eble plej efike ene de la nunaj leĝaj limoj. Tiel, kelkaj vaskaj lingvistoj ĵus vizitis Izraelio-n por studi la metodojn aplikatajn en tiu lando por firmigi la pozicion de la (nov-) hebrea lingvo.

LA

SANTANDER-IDO

La indigeno de Santander estas nomata montañés de la ceteraj hispanoj, tio estas montarano, li estas krude serioza kaj brava same, kiel aspektas lia regiono, dum ĉiuj tempoj; firma kiel la rokoj de liaj montaroj estas; liberaj kaj sendependemaj, kiel estas la agloj kiuj nestas en la nealireblaj tranĉitaj pintosuproj de liaj imponaj montoj; neestimanta la loĝantojn de la ebenajoj, kiujn li konsideris esti malsuperaj, eble ĉar li vidis ilin malpligrandigitaj kaŭze vidi ilinde siaj plej altaj montarsuproj; forta, kiel la kverkoj de liaj arbaroj elvidiĝas; kuraĝa, konsekvence de la seninterrompa luktado kontraŭ la sovaĝaj bestoj kaj la ondoj de la tie ĉi impone furioza maro; nobla kaj grandanima, kvazaŭ kaptite de idealemo, kiu devigas lin rigardi la pluon preter la senfinan lazuron Siritan de la pintoj kaj krestoj de liaj montaroj, kiu devigas lin foriri el lia regiono al aventuro; tiamaniere estis la montarano, kaj tiel li sin montras hodiaŭ bonega civitano hispana, ĉar li konservas ĉion bonan el siaj primitivaj kvalitoj homamantigitaj de la rulado de la jaroj al progreso. Kiu estas lia deveno aŭ origino? Ion pri lia origino oni povas konscii per legado pri la mirindaj grotoj de Altamira.

Ĉi tiu popolo havis siajn simplajn kaj primitivajn leĝojn same, kiel la ceteraj kantabraj gentoj, versen, kaj, kantante ilin, la gento transdonis leĝaron kaj kutimojn de generacio en generacion, kiel konstantan himnon, kiu vigle alparolis pri la nepra libereco, pri la sendependeco spite de ĉio, kaj tiamaniere ĉi tiu gento sentis la liberecon, la sendependecon, ke, okaze de danĝero al tiu sento, la nobla, bona kaj grandanima santanderido transformiĝis sang-elverŝema, kruela; kantante li batalis ĉiam, kantante li mortis ĉe la batalo ne montrante la dorson al la malamiko. Ĉi tiu gento kantis siajn kultojn, siajn

festojn familiajn, lokajn kaj regionajn; la forpason de la vintro kaj alvenon de la printempo plena je promesoj; la kavalirecon, la amon, k. c. La pasado de la tempo, trenante la politikajn, religiajn, sociajn ŝanĝojn, devigante la indigenon al kunvivado kun aliaj gentoj, neniam al submetiĝo, iom post iom modifis ĉi tiujn kantojn, sed rimarkinde estas la greka influo, ĉar ankoraŭ persistadas en iuj valoj, edziĝkantoj kaj funebraj kantoj same kiel dum la tempo de Estrabon, kaj kiel nuntempe en Grekujo mem. El ĉio tio ĉi devenas la riĉega muzika folkloro de Santander.

Ĉar la santanderido estas ema al plej bona ekonomia stato, tial li estas migrantema. Li forlasas la naskiĝlandon por havigi al si riĉaĵojn per sia laboremo kaj sparemo, kaj kiam li estas trafinta sian celon, li revenas al la naskiĝloko, kie li ĝenerale fariĝas sindonema al bonfarado kaj kulturigo; li same elmigras al Ameriko, kiel al aliaj hispanaj regionoj. La elmigrinto, reveninte al naskiĝloko, malavare fondis lernejojn, hospitalojn kaj aliajn kulturigaĵojn kaj bonfarantajn instituciojn. La elmigrinto al Ameriko estas nomata indiano; tiu al Andaluzio, ĵándalo (ĥándalo).

El ĉiuj santanderidoj diferencas la loĝantoj de la valo de l'rivero Pas, nomataj tial pasiegos. Eĉ oni opinias, ke ili estas gento el stranga deveno, kiu trafis la valon dum la militado kontraŭ la maŭroj, kiam ili estis servutuloj, pro kio oni opinias, ke ili estas el mahometa deveno; sed oni devas konstati, ke la pasiego ne ŝatas resti en la sama loko, ke li iras de loko en lokon, kondukante sian brutaron por havigi al ĉi tiu herbojn kaj akvon; ke li estas komercisto; ke la venĝemo estas al li kvazaŭ religia devo nepra, pro kio li konscias malkuraĝa tiun, kiu ne sin venĝas; ke li estas sobra; ke li konservas la arogantecon kaj sendependemon de la pasintaj epokoj, pro kio li malŝatas oficojn, kiuj devigas al submetiĝo, celante ĉu ĉe la lando, ĉu for de ĝi, vivi libere, ne tolerante mastron. Iuj opinias, ke la pasiegos estas tiel aparta gento, kiel estas judoj, cig-

anoj, k. c. Li estas forta, kuraĝa, kalkulema, komercema, industriema kaj lerta. Oni ne povas konscii pasiego'n sen alta bastono, kiu iam estis al li ĉu armilo, ĉu apogilo, ĉu leviĝilo, ĉu ŝildo, ĉar per ĝi li sin ŝirmis kontraŭ spado, lanco, pafita ŝtono; per ĝi, li firmege saltas mirinde kaj fulme riveron, muron, fosajon, k. c.; per ĝi, li ĉasadas...: la bastonego de l'pasiego estas kvazaŭ magia kaj mistera talismano, per kiu li faras mirindaĵojn.


La pasieg'ino estas ankaŭ altkreska kaj forta, kun fizionomio tre agrabla, bela, kun kapabloj samaj, kiaj estas tiuj de la pasiego. Tamen ĉi tiu gento sufiĉe degeneris pro kunpariĝo de samparencanoj.

(El JULIO MANGADA ROSENÖRN: Santander, 1933)



ĈU ALTAMIRA

en danĝero ?



Verŝajne ne estas necesa emfazi la artan valoron de la pentraĵoj de la groto de Altamira, monde konata pro ĝia fama plafono el la prahistoria epoko. Ĝenerale, la pentraĵoj troviĝas sur la muroj de la grotoj, sed Altamira havas unikan plafonon, kio klare distingas ĝin el aliaj konataj kavernoj. Apartenantaj al la akvitan-kantabra stilo, la pentraĵoj de Altamira havas ankaŭ la honoron esti la unuaj science pri-traktitaj, danke al la laboro de Marcelino Sanz de Sautuola.

Post jarcento de ĝia eltroviĝo ŝajnas ke tiuj pentraĵoj suferas gravan danĝeron de malaperigo kaj, lastatempe, pluraj voĉoj leviĝis favore al la tuja kaj definitiva fermo de la groto por la publiko. "HEJS" ankaŭ eĥas tiun danĝeron kaj senpartie volas

pritrakti ambaŭ poziciojn: tiu kiu defendas la neceson fermi la groton kaj tiu kiu konsideras ne necesan tiun fermon.


Jam de pluraj jaroj la franca registaro havas praktike fermatan por la publiko la faman groton de Lascaux. Kaj tio ne estas kaprice farita, sed, kontraŭe, science bazita. Kiel unua paŝo por eviti la definitivitan perdon de la pentraĵoj, la "Patronato de las Cuevas Prehistóricas de la provincia de Santander" rajtigis la "Deutschen Museum" por kopii la plafonon de Altamira kaj instali ĝin tie, en Munkeno (Munich); alia kopio, 9'55 x 4'60 m., estis inaŭgurata la 14-an de oktobro 1964 en la Nacia Arĥeologia Muzeo de Madrid. La matrico de tiuj kopioj estas konservata de tiu Patronaro en Santander.

Aliaj gravaj paŝoj iniciatitaj de la Patronaro estis la limigo de la nombro de vizitantoj: maksimume po 1.150 ĉiutage, la malpermeso fari fotojn interne de la groto, kaj, krome, ĝi estas fermita ĉiujare dum du monatoj. Tamen, ŝajnas ke la pentraĵoj iom postiom estas malaperantaj kaj tio sendube pruvus ke la enkondukitaj dispozicioj estas ne sufiĉaj.

Nacia revuo ("Sábado Gráfico": P.B.L., 'Altamira, una reliquia universal que se pierde') priatentis tiun fakton en pasintjara oktobro (nº 958, 8-14. 10.1975), kaj diversaj reagoj sekvis. La tagjurnalo "Informaciones" aperigis informon de Martín Almagro Basch (12.11.1975), katedra profesoro pri Prahistorio kaj direktoro de la Nacia Arĥeologia Muzeo, kiu ankaŭ opiniis ke la difektado de la altamiraj pentraĵoj estas nediskutebla fakto; al tiu opinio aliĝis kelkaj aliaj fakuloj pri prahistorio.

Ŝtata departemento, la "Dirección General del Patrimonio Artístico y Cultural", tamen argumentis precipe surbaze de la konscio pri tiu problemo kaj de la dispozicioj enkondukitaj en la lastaj jaroj, kio pravas la konstantan priatenton sur la famaj pentraĵoj.

Ĉiuckaze, la fakuloj esprimis sian deziron koni la kriteriojn sur kiuj bazigas tiu "Dirección Gene-



ral" la opinion ke "ne estas observataj difektadon de la pentraĵoj", kaj kiuj fakuloj publike sin respondecas de ke la surroka hispana arto survojas en nenian danganon.

Denove, ni devas pledi por io ne apartenanta al iu individuo, sed al la kolektivo. Denove, ni devas memori vin ke antaŭ ol privataj aŭ personaj interesoj, estas la konservado de niaj komunaj riĉaĵoj kaj do ankaŭ de la artaĵoj. Tial estas nia nepra devo resti konsciaj pri nia respondeco por la estontaj generacioj kaj jen plia kaŭzo por kune iri antaŭen: Konservado de la altamiraj pentraĵoj estas, do, grava devo por ni ĉiuj.

JUAN AZCUÉNAGA

⇒ " SURINAMO OFICIALIGOS LA KASTILIAN " ⇐

Surinamo adoptos, baldaŭ, la kastilian lingvon kiel oficialan lingvon de la lando, cele al plifortigo de rilatoj kun siaj sudamerikaj najbaroj. tion anoncis en Caracas (Venezuelo) la prezidanto de la surinama respubliko, E.L.A. Wijntuin.

La plej multo de la surinama loĝantaro parolas la anglan kaj nederlandan lingvojn, sed la proksimeco kaj la deziro pliintegriĝi en hispanameriko faros ke la kastilia estu aprobota kiel oficialan lingvon.

Deziras korespondi

■ La E-junularo el Riga deziras interŝanĝi leterojn, bildkartojn, prospektojn, ktp. Skribu al:

J. Gold / Gorkija 18 - 1-a / RIGA-50 (Sovetunio)

■ 28-jara japana junulo deziras korespondi pri ĉiuj temoj, precipe pri kulturaj aferoj kaj E-movado.

S-ro: TAKAHASHI-Yoshiteru / 6-15 Sakashita-cho
Isogo-ku YOKOHAMA-235 (Japanio)

BURGOS: NOVA GRUNDO

Dum la lastaj monatoj, la esperanta semo trovis bonan grundon en la historia kastilia ĉefurbo Burgos. Fervora entuziasmulo, S-ro, Adolfo Alvaro, post plurjaraj klopodoj, nun gvidas esperantan kurson kun la mirinda nombro de ĉ. 60 junaj gelerantoj. Por la klasoj estas disponigita ejo en la Ina Mezlernejo.

Por apogi tiun ĉi burĝonon de esperanta vivo, helpita jam antaŭe de unuopaj esperantistoj kaj diversaj grupoj, kunvenis en Burgos la 6, 7 kaj 8-an de decembro membroj de la grupoj de Madrid, Palencia, Santander, Rentería, Valladolid kaj Bilbao. La nombro de vizitantoj estis ege kontentiga: pli ol 90.

Ĉefa celo, krom la fomento de amikeco inter samideanoj, estis la diskonigo en la urbo de la ekzisto de esperanto kaj la loka grupo. Tion oni atingis pere de la radio kaj ĵurnaloj. Ankaŭ okazis publika prelego pri la Internacia Lingvo, fare de la Bilbaŭano S-ro. Iranzo. Ni bedaŭris ke, eble pro nekonsento de la horo kaj dato, ĝin ĉeestis nur... esperantistoj.

La ceteron el la programo konsistigis vizitoj al diversaj monumentoj, abundaj en tia antikva urbo, esperanta meso, projekcio de prikongresa filmo, kaj frataj vespermanĝoj kaj bankedo.

La etoso, kiel ĉiam amika, estis des pli simpatia inter la multnombra junularo, tiel loka kiel vizitanta. Aktivaj HEJS-anoj sukcese varbis novulojn.

Por pli ĝusta pritakso, mi esprimas kelkajn pensojn: ne sufiĉe bone funkciis la loĝiga servo, pro eksterordinara alveno de ĉasistoj, kaj ambaŭ manĝoj estis tro kostaj por sia vera enhavo. Sed tiaj mankoj ŝuldiĝas simple al nesparteco. Ankaŭ la lingva fluideco de la entuziasma instruanto kaj gelerantoj pliboniĝos post praktikado en internaciaj kongresoj.

Resume, mi certas ke mi esprimas la kontenton de la ĉeestintoj dirante ke ili ĉiuj apogus proponon por ke Burgos gastigu la nacian kongreson de 1977. Tiel estu!

ASIER

kantas la vjetnama patrino

Teksto: Ueyama Masao — Muziko: Gianfranco Molle

Kiam venos ree nin kolomb'
forfluginta el la fum' de bonb' ?
Ĉu ĝi vivas ie sen danĝer' ?
ni atendu, kara, kun esper'.

kiam floros rozo sur la kot'
eltretita de l' usona rot' ?
Ĉu ĝi ĝermos iam por refoj' ?
ni atendu, kara, sen malĝoj'.

Kiam paĉjo hejmen venos kaj
en la brakoj tenos vin kun gaj' ?
Ĉar batalas li por la liber',
ni atendu, kara, kun esper'.

Noto: kanti unua kaj dua "LA", kaj la tria same sed "DO".

La ordo devas esti: 1-2-3-2-3--

Heidi



La hispana televido estas la enuiga drogo per kiu granda kvanto (bedaŭrinde) de hispanoj, reguligas sian alienecon. Eble tiu aserto ŝajnos troa al kelkaj el niaj legantoj, tamen se oni zorge (ankaŭ sen multa zorgo oni atingas la samajn konkludojn) atentigas pri la kvanto kaj kvalito de la elsendataj programoj, oni rapide konstatas ke la kulturaj kaj edukaj programoj troviĝas en skandala malavantaĝo kompare kun la granda amaso de usonanoj (ĝenerale temas pri filmoj plenaj de perforto) kaj aliaj enlandaj produktaĵoj, indaj je la plej proksimaj rubujoj.

Eble pro ĉio ĉi, Heidi, tuj post ĝia apero atingis la plej altan pinton de populareco en nia lando. Tiu filma serio prezentas per "vivantaj desegnoj" unu el la partoj de la fama verko de Johana Spyri (svisino) "Unu historio por la infanoj kaj por la plenkreskuloj kiuj amas la infanojn" aperinta unuafoje en 1880, kaj poste tradukita en multajn lingvojn (ĉu ankaŭ en esperanton?). Heidi estas kanto pri la naturo esprimita per rakonto riĉa je nuancoj kaj plena de poezio. La dolĉeco kaj harmonio entenataj en la filmo frape kontrastas kun la aliaj televidaj produktaĵoj destinitaj al la infanaro kies instruoj preskaŭ nur konsistas el perforto kaj suprajeco.

Do... Bonvenata estu Heidi!

tao

3

En ĉi numero de la revuo aperas la lasta parto de la sciencfikcia bildrakonto "La okulo de la morto", kaj nia laborema amiko TAO komunikis al ni, ke li estas preta daŭre kontribui al la redaktado de nia kara HEJS-bulteno per tiaspecaj serioj de rakontoj; tamen la redakcio ŝatus ricevi ian indikon fare de la legantaro, por aŭ kontraŭ ilia daŭrigo. Do, bonvolu sendi leteron al la redakcio kun via opinio. Dankon.

Red.

TAMEN LA OKULO NE TUŜIS MIN. ĜI RESTIS ŜVERE EN LA KONTRAKTAUTO, OBSERVANTE MIN KONSTANTE. MI VOLAS DISPECIGI TIUN HORORAĴON SED MANKIS AL MI FORTO.



LA HOROJ PISIS KVAZAŬ JAROJ. LA VOLO DE LA OKULO ESTIS PLU GRANDA OL LA MIA. IEL ĜI DIKTIS AL MIA MENDO TION, KIDN ĜI VOLIS EL MI. MI IĜIS ĜIA SERVANTO DONANTE AL LI MANGAĴON DE TEMPO AL TEMPO.



EVIDENTIĜIS KE TIUJ PROTOPLASMAJ, KARNOVOROJ EKSTERMIS LA VENUSAN CIVILIZACION DORANTE ĈIUN HOMAN ESTAĴON. NUN TIU RUZE PLANIS VOJAĜI EN ALIAN MONDON POR SATIĜI PER ALIAJ ESTAĴOJ.

ĜI NE ATINGOS LA TERON!
MI FRAKASOS LA ŜIPON
KONTRAŬ LA
LUNON!



LA OKULO ŜAJNE DIVENIS MIAN INTENCION, ĈAR KIAM HI KLOPDIS PILOTO LA KOSMOŜIPON KONTRAŬ LA LUNON MI TROVIS MIN NEKAPABLA ĜIN FARI.

NE...MI NE POVAS...NE!



NI ESTIS JAM PROKSIMAJ AL LA TERO. MIA NOVA PLANO ESTIS FRAKASI LA ŜIPON KONTRAŬ MIAN NASKIĜPLANEDON.

MI DIREKTIĜOS AL
MELOĜATA REGIONO,
TIEL FINOS ĜI INKUBSONĜO!



TAMEN BENDVE MI ESTIS TROMPITA! ESTIS DEZIRO DE LA OKULO SURTERIĜI SENMANGERE, KAJ LASTMOMENTE MI TROVIS MIN STREBANTE PENE SURTERIĜI!



LAAŬSAJNE LA LONGA RESTADO DE GILPIN EN LA KOSMO, KONFUZIS LIAN CERBENON. MIA HISTORIO ESTIS GROTESKA, SEKVE MI DECIDIS GANĈI TEMPON POR KONTAKTI LA AŬTORITATULOJ.

TAMEN... KIE
ESTAS NUN LA
OKULO?

NE DEMANDU TION!
LASU ĜIN TRANKVILE KAJ
FORIRU DUM VI HAVAS
TEMPON!



... ANTAŬ OL ĜIA VOLO
IGIS MIN MALFERMI
ĜI SAKETON!

**DIABLE!
ĈU TIO ESTAS
SERĈO?**




HORORE, LA OBJEKTO DE LA SAKETO LEVIĜIS
MALRAPIDE AL MI... KAJ KOMENCIS KRESKI.

**NE
ESTAS
EBLE!**



MALANTAŬ LA OKULO ĜILPIN ĜAJNIS
LIBERIGI DE ĜIA POVO; LI PRENIS
TONDILON DE SUR MIA TABLO KAJ
ENPIKIS ĜIN EN LA VISKOZAN
KREITAĴON.



TIO, KIO OKAZIS
POSTE, ESTIS TE-
RUREGA... LA
OKULO TURNIĜIS
RAPIDE AL ĜILPIN.


**NE, MI
NE POVAS
RIGARDI!**



MOMENTO POSTE NUR UNU MANO KON-
VULSIIS ANKORAŬ EKSTER LA ĜIBO.



ANKORAŬ PLIVASTIĜANTE, ĜI TURNIĜIS DENOVE AL
MI... SEN ELIRVOJO, MI FORPRENIS LA TELEFONON
POR ĴETI ĜIN AL TIU PERVERSA PUPILO, SED IA
VERDA VAPORO TRAFIS MIAN VIZAĜON KAJ TUJ
MI TROVIĜIS SENDEFENDA.



POSTE MI SENTIS LA GLUECAN KAJ HORORAN
KONTAKTON DE PROTOPLASMA KORDO,
MANGANTE MIN TUTE...

